

Eduka valoro de la fido en la herooj, 2-a parto

Claude Gacond, 94-a radioprelego, 1964.09.16 & 19

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio pri la eduka valoro de la fido en la herooj. Vi aŭdas Claude Gacond.

Dum la pasinta elsendo ni konstatis, ke intimiĝo kun la biografio de grandaj homoj alportas fidon en la vivo. Ni demandis nin, kiuj herooj povas anstataŭi la bibliajn patriarkajn figurojn kaj ekleziajn sanktulojn, kiuj hodiaŭ perdis sian influon sur la junularon.

Alice Descoedres, granda svisa edukistino, jam provis respondi al tiu demando. Ŝi eldonis sub la titolo ***Herooj, Ankoraŭ herooj, Herooj kaj heroinoj, Heroaj vivoj kaj Herooj de la paco*** interesajn biografiojn pri la plej universalaj vivoj de la komenco de nia jarcento kaj de la pasintaj jarcentoj. Instruante infanojn ŝi konstatis, kiom forte ili emis povi identiĝi kun heroaj figuroj. Ŝi ankaŭ konstatis, ke ĝis nun la instruistaro nenion alportas al la infanoj por respondi al tiu soifo je kontaktiĝo kun heroaj vivoj. Ŝi konstatis, ke la komercistoj siaflanke estas pli lertaj. Ili famigas varojn dank'al famaj nomoj de sportistoj kaj filmsteloj kaj en komercaj propagandiloj popularigas tiujn heroajn figurojn.

Hodiaŭ tiu komerca politiko fariĝis ankoraŭ pli sistema. Kiel instruisto mi rimarkis ĉiutage la influon de maĉguma propagando. En aŭtomatoj estas ofertataj maĉgumoj kun fotoj de sportistoj kaj filmsteloj. Sur tiuj bildoj estas eĉ presita la vorto **idolo**. La infanoj, kiuj hazarde aĉetis unu maĉgumon, admirante la bildon de la idolo deziras akiri ĉiujn aliajn bildojn. Sed por ilin havi, tiam necesas aĉeti multajn aliajn maĉgumojn. Ofte troviĝas plurfoje la sama bildo. Interinfana komerco favoras la necesajn interŝanĝojn. Sed por la pedagogo komenciĝas vana luktado kontraŭ la konstanta maĉado de la gelernantoj. Dum tiu tempo la cigared-fabrikantoj ridaĉas. Ili scias, ke kiam la infanoj estos bone kutimintaj maĉadi la tutan tempon kaj elspezi sian monon per neniaĵoj, tiam poste ili rapide kutimiĝos fumadi la tutan tempon kaj elspezi sian monon por afero ne nepre necesa. Kaj por tion akceli, ili konstante ŝanĝas la seriojn de la bildoj de la idoloj. Do por povi posedi tutan serion, necesas aĉeti ĉiutage almenaŭ unu maĉgumon. Post tiu kutimiĝo la junulo aĉetos ĉiutage skatolon da cigaredoj. Lia sano iom suferos pro tio, sed la komerco bone fartos.

Kion povas fari kontraŭ tio la edukistoj: gepatroj kaj instruistaro? La plej taŭga rimedo ŝajnas al mi senmaskigi la ludon de la komercistoj kaj samtempe proponi al niaj infanoj aliajn heroojn. En tiu oferto oni devas montri, ke la herooj de la maĉgumoj estas plejofte nur kometoj, dum la herooj, kiujn ni al ili prezentas, restas veraj steloj, kiuj lumigas nian vojon eĉ dum la nokto. Oni ankaŭ devas gvidi la infanojn al la magazenoj, kie oni povas aĉeti belajn librojn de iliaj ŝatataj herooj kaj interesajn librojn. Oni devas veki ĉe la infanaro avidemon por la legado. Koncerne tion la porinstruista lernejo en la kantono Neuchâtel, kun la helpo de la instru-ministerio kaj instruistaro de diversaj vilaĝoj, alvenis al promesigaj sukcesoj. La gustoj de la infanaro tiom ŝanĝiĝis, ke la kioskoj, anstataŭ daŭre propagandi stultajn gazetetojn kaj bombonaĵojn, petis al la porinstruista lernejo regulajn informojn koncerne belajn porinfanajn librojn. Kaj nun en la montrejo de tiuj kioskoj vi trovas altirajn kaj vere altnivelajn nutrigajn infanlibrojn. Pri tiu eksperimento mi foje rakontos al vi multe pli detale.

La edukistino Alice Descoedres en siaj biografiaj libroj prezentis kvardekon da vere universalaj herooj. Estas homoj el diversaj landoj, kies nomoj estas ofte fame konataj, sed kies vivo estas nekonata. Ni citu ekzemple la nomojn de Francisko el Asizo, la sanktulo, kiu onidire parolis al la birdoj, de Pestalozzi, la savinto de la georfoj en la alpa kantono Nidwalden kaj hodiaŭ famiĝinta edukisto. Ŝi rakontas pri alia edukisto, kies haŭto estis nigra : la usona Booker Washington. Ŝi prezentas la kuraĝon de Fridtjof Nansen, homo kiu ne nur honoris sian landon Norvegio sed la tutan homaron. Ŝi rakontas la malkovrojn kaj influon de Pasteur, la talenton de Beethoven, la amon por la enkarcerigitoj de Mathilda Wrede, la fidon de William Penn, la neperfortemon de Tolstoj kaj de lia disĉiplo Gandhi. Ŝi ankaŭ rakontas pri nia Majstro Ludoviko Zamenhof. Oni eĉ povas diri, ke se en Romandio, la franclingva

Eduka valoro de la fido en la herooj, 2-a parto

Claude Gacond, 94-a radioprelego, 1964.09.16 & 19

parto de Svislando, la hodiaŭa elito simpatias kun nia lingvo kaj idealo, ofte estas ĉar ĝi identiĝis kun la kuraĝa kaj sindonema Zamenhof dum sia juneco.

Post kvarona centjaro tiuj libroj ne eksmodiĝis. Ili nur elĉerpiĝis. Ili meritis reeldoni sub nova kovrilo kun aldono de kelkaj novaj heroaj figuroj. Ĉu tio okazos? Alice Descoeurdes mortis. Ŝia voĉo silentis. Tamen oni devas agnoski, ke dank'al ŝi multaj edukistoj dediĉis siajn fortojn al la verkado de tre belaj infanaj libroj, al la prezento de tiuj libroj al la infanaro kaj al la protektado de tiu infanaro kontraŭ maltaŭgaj legaĵoj.

En Esperantujo mankas tiaj libroj, kiuj prezentas al la junularo galerion de homaranaj herooj. Tamen niaj gejunuloj devus povi intimiĝi kun la vivo de tiuj, kiuj alportis al ni novan fidon en la homaro. Ni provos dum tiu ĉi aŭtuno kaj vintro prezenti kelkajn belajn heroajn vivojn. Ni multobligos la tekstojn de tiuj prelegoj, kaj sendos ilin al la aŭskultantoj, kiuj esprimos la deziron ilin ricevi. Nia espero estas, ke tiuj tekstoj estos legataj en niaj kluboj al la junularo, en la lernejoj kursoj kaj en la domoj, kie la infanoj lernas la mondan lingvon.

Vi aŭdis Radio-Svislandon. Claude Gacond parolis pri la eduka valoro de la fido en la herooj.

Ĝis reaŭdo !

-oOo-